# LA SKOLTA MONDO.

Trimonata revuo Organo de Skolta Esperanto Ligo



Volumo 5
N-ro 12

Jul-dec. 1978

S E L

SKOLTA ESPERANTO LIGO
Postbus 433
1500 EK Zaandam Nederlando.
Poŝtĝirkontc 54 36 47
************

Fondinto "Avoto", A.W. Thomson.
Kunfondinto: J.W. Leslie.

Honoraj Prezidantoj:
Avoto, D.H.Davis, L.J. VanGulck.

Prezidanto: John Berggreen, Brattvollveien 23c, Oslo 11, Norvegujo. Telefono 02-283035

Sekretario: J.K. Hammer, Taxusstraat 7, 1505 AA Zaandam, Nederlando Telefono 075-166931

Kasisto kaj Administranto de L.S.M.: David H. Withey, 21 Brookfield Ave. Waterloo, Liverpool L 22 3ye, Britujo. Telefono 051-928-2936.

Redaktoro: Hans Amund Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien, Norvegujo. Poŝtkto 8030413, Tel 035-21848.

Membroj de la Centra Komitato:
Allan Fineberg, 76 Seventeenth Ave., Paterson, NJ 07531, Usono.

Ŝindo- Seitaro, Nisi-mikuni-1-tyôme 200, Higasi-yodogawa-ku, Osaka-si, Japanujo.
*************

Skolta Esperanto-Ligo eldonis:

Ĵamborea Lingvo (lernolibro).

Skolta kaj Tenduma Terminaro.

Ĵamboreaj Notoj (priparolo de la 14 ĝisnunaj ĵamboreoj. Esp.lingva)

Jamboree Story (Sama en angla)

Pli vasta horizonto (informa kaj ideo-dona libreto eldonita en la lingvoj angla, araba, franca, germana, japana, hispana, nederlanda kaj norvega.)

Mi provis denove
fari al vi revuon
el kiu vi povis trovi
ion.
Mi ĉerpis el "World Scouting"
la artikolon pri
La Malnova Persio
sed redonis nur elĉerpaĵon
ĉar la originalo
estas tro longa por
nia modesta revuo.
Mi uzis ĝin
pro la venonta
ĵamboreo.
Sed la nunaj politikaj
novaĵoj
el la lando
vere timigas nin:
ĉu vere ni povas sendi
knabojn
al lando kun tia
maltrankvilo?

Krome en la revuo
vi trovas kion mi scias
pri novo en nia movado.
Pri eventoj en
aliaj landoj.
Sciu:
Mi estas nur redaktoro,
kaj tio signifas
ke mi uzas
kion mi ricevas
se tio estas uzebla.

Tiel la revuo
respegulas ankaŭ
la movadon.

Kaj nun ni iros
en novan jaron.
Tial
mi uzas ĉi tiun lokon
por deziri al vi
benitan kristnaskon
kaj feliĉan
novjaron!

Via

Hans Amund

# La stato

Iom malfrue - tamen ni kredas ke la subaj letero kaj ciferoj de la kasisto havas kaj intereson kaj valoron por niaj legantoj. Ni lernas flankon de la stato de nia Ligo.
La kasisto skribas:

Financa raporto de SEL, centra kaso.

Ne plaĉas al mi eldoni aron da ciferoj, kiuj sen komparo estas tute sensignifa. Tamen, mi ĵus faris kontrolon de la centra kaslibro kaj mi devas raporti pri iom pli bona situacio ol dum la ĵuspasintaj jaroj.

1977.

| Enspezoj | | Elspezoj | |
|---|---|---|---|
| La Skolta M. | 48.71 | Poŝtelspezoj | 30.68 |
| Kotizoj | 53.07 | Ab. "World Sc." | 7.50 |
| Diversaj | 31.30 | LSM - preskostoj | |
| Rentumo kaj | | 2 nr per HAR | 184.36 |
| interezo | 135.05 | 1 nr B.E.A. | 39.00 |
| | | Anonceto pri | |
| | | Wider Horizons | 6.12 |
| | | GAJNO 1977 | 3.47 |
| | 271.13 | | 271.13 |

= = = = =

| Bilanco | | Mono | |
|---|---|---|---|
| Saldo 1976 | 312.14½ | Ce banko | |
| | | Depona kto | 225.68* |
| Gajno 1977 | 3.47 | Kuranta " | 70.36 |
| | | Brita E.A. | 30 |
| | | Kasisto | 19.27½ |
| | 315.61½ | | 315.61½ |

*inkluzivas £175.25 de la Paul Blaise-Fonduso.

La antaŭvidata gajno por 1978 estas £30, do la afero iom pliboniĝos. Tamen la centra kaso ankoraŭ ricevas duonon de ĝia enspezo el la rentumo kaj interezo de la Kapitala Fonduso. Kiel mi jam rimarkis en antaŭaj financaj raportoj la kotizoj, abonoj kaj vendoj tute ne sufiĉas.

De 1975 ĝis 1977 la pozitiva saldo falis de £484.55 ĝis £312.14½!

David Withey.
Marto 1978.

# paŝoj

Pasintnumere ni havis kelkajn konsilojn pri aktiveco, kiujn ellaboris nia ĝenerala sekretario. Ni nun redonas la duan parton de liaj konsiloj, sub titolo:

PAŜOJ AL PLI BONA ESTONTECO!

Verdire: la ideala sekcio ne jam ekzistas. Krome: inter la 115 landoj kun oficialaj skoltaj asocioj SEL havas nacian reprezentanton nur en ĉ 25! (UEA havas delegiton en 54 el tiuj landoj).
Sed kiam ĉiu el ni farus nur UNU - NUR UNU PAŜON - en la bona direkto, nia ligo havos pli bonan estontecon.

Kaj jen 10 paŝoj al la pli bona estonteco:

1. En via lando estu UNU persono, kiu estu PERANTO aŭ REPREZENTANTO de SEL, kiu respondas al informpetantoj kaj korespondas kun la Centra Komitato de SEL.
2. Li registras membrojn kaj abonantojn. Li kolektas la kotizojn por transpago al la Centra Kaso. Li dissendas "La Skolta Mondo"n al la membroj.
3. Li aktive varbas membrojn kaj korespondas kun skoltaj instancoj. Unufoje en la jaro li raportas pri siaj agadoj al C.K.
4. Dua persono aktive helpas al la NR kaj dividas kun li la taskojn. Kiam tio estas necesa (malsano ktp), li transprenas la laboron.
5. Oni eldonas nacian SEL-bultenon por aktivigi la membrojn kaj plifortigi la ligon inter ili. Eventuale rubriko en nacia E-gazeto sufiĉas.
6. Kelkaj membroj dividas inter si la diversajn taskojn. Ili garantias konstantan kaj senriproĉan laboron.

7. La mebroj de tempo al tempo organizas nacian renkontiĝon, ekz. dum nacia E.-kongreso aŭ skolta kunveno.

8. Grupeto de membroj organizas aktivajn propagandajn kampanjojn dum skoltaj kunvenoj.

9. La membraro starigas konstantajn komitatojn aŭ komisionojn, kiuj ĉiu prizorgas specialan taskon, ĉu en la organizado, ĉu en la propagando kaj varbado por SEL.

10. Oni fondas oficialan sekcion de SEL, kiu demokrate elektas sian estraron kaj proponas unu personon por la tasko de Nacia Reprezentanto (ekz. la sekretario de la sekcio). Kiam la enlanda situacio tion permesas, oni ĉiujare havu laŭstatutan jarkunvenon.


# N.R.

La Centra Komitato bonvenigas jenajn novajn NR:

1. julio: Erik L.B. Otte por Svislando.
1. julio: Robert W. Rapp por Usono.
1. septembro: Maria Teresa Nunes Constancio por Portugalujo.
1. septembro: Roger Randrianekena por Madagaskaro.

Samtempe ni dankas al Allan Fineberg pro bona laboro kiel antaŭa NR por Usono kaj membro de Centra Komitato.

John Berggreen,
Prez. de SEL.




En Svisujo (Chaux-de-Fonds) okazos en la 2-a kaj 3-a de decembro gravega kultura semajnfino:
Oni invitas al dekjara jubileo de KULTURA CENTRO ESPERANTISTO kaj enaŭguro de du domoj jus aĉetitaj. Oni celas amaspartoprenon por montri al la aŭtoritatoj ke esperanto ne nur estas ŝatokupo de elito, sed efektiva tutmonda realaĵo, kaj oni preparis enhavoriĉan kaj interesegan programon.
Pliajn informojn kaj la detalan aliĝilon petu ĉe Kultura Centro Esperantisto, poŝtfako 771 CH-2301 La Chaux-de-Fonds, Svislando. Aldonu 1 internacian respondkuponon.

*******

Invitas nin s-ro Franz Schwärzler al sia domo por kelktaga restado se vi venas al okcidenta Aŭstrujo, kaj li promesas montri sian urbon kaj regionon.
Tiu informo atingis nin tuj post forsendo de la manuskriptoj de la pasinta numero, sed ni fidas, ke la invito ankoraŭ validas.
La adreso estas: Franz Schwärzler, Kirchstr. 26, A-6900 Bregenz.

*****


El Germanujo ni ricevis jenon:

tiuj, kiuj serioze okupiĝas pri folkloraj kantoj......
Goar Engeländer, Thomasweg 3, D-4796 Salzkotten, Germanujo.

***

Se vi deziras aŭdi la voĉon de via redaktoro vi povas aŭskulti al la radiostacio IBRA kiu elsendas en Esperanto ĉiumarde je la horo 21.30 MET per ondlongo 49.92 m = 6010 MHc.
La programoj estas edifaj, kaj Rosbach parolas en la mardoj 12.a de decembro ĝis 23.a de januaro. Poste transprenos alia norvega pastro Vidar Vik dum kvar semajnoj nia sveda membro Olle Olsson dum du.
Se vi aŭskultas - bonvolu skribi pri la programo al IBRA, S-105 36 Stockholm, Svedujo.

*




# la malnova Persio

La homoj en Irano, kiel la plimulto de Eŭropanoj, estas Hindo-Eŭropeoj Antaŭ jarmiloj tiuj homoj migradis, ĝis ili trovis siajn hejmojn ek de la limoj de Hindujo ĝis la Atlanta maro.
Dum la migrado ili apartiĝis, kaj perdis la kontakton. En la komenco ili parolis la saman lingvon, sed tiu evoluiĝis en diversaj manieroj, ĝis la opaj triboj - vaste apartigitaj - ne plu povis kompreni unu la alian. Ili eĉ forgesis la parencecon. Sed la ĉefaj lingvoj de la moderna Eŭropo havas la saman fonton, kaj oni povas vidi la parencecon pere de multaj vortoj:

| Okcidente | | | | | | Oriente | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| Esperanto | Angla | Germana | Franca | Latina | Greka | Malnovpersa/Avesta | Sanskrito |
| frato | brother | Bruder | frère | frater | phreter | bratar | bhratar |
| patrino | mother | Mutter | mère | mater | meter | matar | matar |
| patro | father | Vater | père | pater | pater | pitar | pitar |

La plej orienta tribo paŝtis ĉe la Kaspa maro ĉ 2000 antaŭ Kristo. Kaj ekestis popolo la Arioj. Je 1800 a.K. la ariaj triboj dispartiĝis, kaj kelkiuj migris sudorienten ĝis Hindujo. Aliaj triboj, kiuj konservis la nomon Aria en la formo Irano, migris okcidenten kaj sudokcidenten al la montoj ĉe la riveregoj Tigris kaj Eŭfrato. Inter tiuj estis la du triboj la Medoj kaj la Persoj.
Ĉ. 700 a.K. la Medoj kreis potencan imperion en la montaro oriente de Tigris. Ĝi disvastiĝis de la Persa Golfo, kie ĝi kunprenis la Persojn, laŭ la montaro nordokcidenten al la Nigra Maro. La ĉefurbo estis Ekbatana, kiu situis ĉe la trapasejo tra la Zagromontaro al la urbo Babilono. Kaj jarcento poste Nebukadnezoro kaj liaj posteuloj rigardis kun timo kaj atento al tiu danĝera Meda regno, kiu tiel bonvole kuniris al la atako kaj konkero de Ninivo en 612 a.K.

Religio.
Generacio post la falo de Ninivo aperis granda instruisto, Zoroastro. Li predikis religion kiu devis renkonti la bezonojn de la homoj. Li rigardis la senĉesan batalon inter Dio kaj Malbono. Li povis vidi ĝin ĉie. Dion li nomis Mazdo aŭ Ahuramazdo, kio signifas "Sinjoro de Saĝeco". Lin ĉirkaŭis grupo de helpnatoj aŭ anĝeloj, el kiuj la plej granda estis Mitro, la lumo. Kontraŭis Ahuramazdon la malbona spirito Ahriman.
La religio vokis al ĉiu homo helpi al unu el tiuj potencoj - plenigi sian spiriton per bono kaj lumo, aŭ resti en malbono kaj mallumo. Kaj laŭ sia elekto kaj vivo ĉiu ricevos sian juĝon. Himnoj kaj fragmentoj de la instruo de Zoroastro herediĝis al ni per libro konata kiel Avesto.



La Persoj.

Neniu tiel fervore sekvis Zoroastron kiel la tribo nomita la persoj. Je la tempo de la falo de Ninivo ili jam longe trovis sian loĝejon en la sudorienta parto de la Zagromontoj, tuj norde de la Persa Golfo. Ili havis nek alfabeton nek literaturon, kaj preskaŭ neniun regadon. Sed unu el la triboj en la montoj de Elam formis reĝlandon Ansha. Ĉ 50 jaroj post la falo de Ninivo regis ĝin la reĝo Ciro. Li unuigis la persojn, kaj ribelis kontraŭ la medoj. Ciro instruis siaj kamparanojn fariĝi soldatoj laŭ ekzemplo de la Asirioj, kaj nun li ekmarŝis okcidenten al la Malgranda Azio, konkeris la regnon Lidio, konkeris la ĉefurbon Sardo kaj enkarcerigis la reĝon, la riĉa kaj potenca Kroezo. En la daŭro de 5 jaroj la malgranda reĝlando en Elam fariĝis la plej potenca en la orienta mondo. Ciro trovis neniun malfacilaĵon en la batalo kontraŭ la kaldea armeo, gvidata de la kronprinco Belt-ŝacar (kies nomon ni trovas en la libro de Daniel en la Biblio), kaj spite al la fortaj muroj kiujn konstruis Nebukadnecar por brotekti Babilonon, la persoj ŝajne sen kontraŭ-staro prenis la grandan urbon en 538 a.K. 9 jarojn poste Ciro falis en batalo, kaj entomb-iĝis en la tombo, kies bildon vi vidas supre, kaj kiu estas vizitebla eĉ hodiaŭ.
Kvar jarojn poste la filo, Kambiso konkeris Egipton, kaj tiel la persa imperio ampleksis la tutan civilizitan mondon ek de la Nilo kaj la Meditarenio ĝis la limoj de Himdujo

La persa kulturo.

La persoj trovis en la konkeritaj landoj grandajn urbojn kun grandegaj monumentoj. Kaj nun ili komencis konstrui palacojn laŭ modelo de la aliaj popoloj. La grandegajn terasojn sur kiujn ili konstruis la palacojn, ili imitis de la babilonanoj, la flugilportantajn vir-bovojn je la grandegaj pordegoj kaj la ŝtuparojn ili vidis unue en Asirio, kaj la kolon-aroj - la unuajn kolonarojn en Asio - similis al la cent jarojn pli aĝajn ĉe la Nilo. Kaj same la koloraj brikaj muroj estis ideoj el Egipto kaj Asirio.
La aramea lingvo nun fariĝis la ĉie uzata. La komercaj paperoj nun skribiĝis en la aramea per plumo kaj inko, sur papiriso. La argilajn tabulojn oni iom post iom ĉesis uzi. Tiel la persa regno disvastigis du lingvojn, la malnova persa kaj la aramea. Sed eĉ dum oni uzis la persan, oni tamen plej ofte uzis aramean alfabeton. La persa alfabeto estis tridek-naŭ signoj en la kojnforma skribo, verŝajne heredaĵo de la medoj. Kaj tiuj persaj kojnformaj enskriboj montriĝis tre gravaj por helpi al la kompreno de la babilona skribo.
La organizado de la granda imperio estis malfacila tasko. Ĝin komencis Ciro, sed plenumis Dario la granda (521-485 a.K.). Li ne deziris fari pluajn konkerojn, sed decidis fortigi la hereditan. Tiel li igis sin reĝo de Egipto kaj de Babilono, sed dividis la ceteran al dudek provincoj sub kontrolo de guberniestro aŭ satrapo. La provincoj ricevis ampleksan sendependecon - se oni nur pagis impostojn kaj sendis soldatojn por la armeo.
En la oriento la impostojn oni pagis per naturaĵoj, kiel pli frue. Sed en la okcidento la uzo de mono estis ordinara jam en 600 a.K., kaj tie la impostojn oni pagis per moneroj.
Dario mem faris monerojn el oro, kaj la satrapoj rajtis fari arĝentajn monerojn.
Ankaŭ sur la maro Dario faris grandajn penojn por krei persan potencon. Li sendis la faman mariston Skilakso por esplori la riveron Induso, kaj poste vojaĝi laŭ la bordo ĝis Isthmo ĉe Zueso. Ce Zueso Dario renovigis la malnovan, sed nun plenŝtopitan, kanalon per kiu la Egiptanoj kunigis la Nilon kun la Ruĝa Maro, kaj tiel li havis navigeblan ŝipirejon de la

persa marbordo al la mediteraneo.
Kontraste al la Asirioj, Dario milde traktis la fenikianojn, kaj sukcesis organizi grandan fenikian militŝiparon, kaj tiel la persa regno estis la unua granda marforto de Azio. Krome la regno konstruis reton de bonegaj vojoj, per kiuj reĝaj heroldoj fondis regulan poŝt-sistemon.


La falo de la imperio.

Por la orienta mondo la regno signifis ducent-jaran pacon. La malfruaj persaj reĝoj tamen ne estis tiel fortaj kaj lertaj kiaj Ciro kaj Dario. Ili ŝatis lukson, komforton, kaj transdonis multajn taskojn al la guberniestroj. Tiel la regno fariĝis korupta, kaj la persa influo malkreskis.
La posteuloj, ĉefe la grekoj, ofte prezentis la persajn regnojn kruelaj kaj barbaraj, tiranaj. Sed tiu opinio ne estas tute justa. Estas neniu dubo pri tio, ke la persa imperio, la plej granda kiun spertis la olda mondo, havis pli justan kaj pli humanan regnon ol iu pli frua en la Oriento. Sed kompreneble la plivastigo de la imperio al la teritorioj de Eŭropo, kreis neeviteblan konflikton kun la grekoj. Kaj kvankam tiuj militoj ne signifis multon por la persoj, ili havis decidan influon por la malgrandaj regnoj kiaj la grekaj.
La grekaj urboŝtatoj en Malgranda Azio ribelis kun helpo de la atenanoj. Tio gvidis al la persaj invacioj de Eŭropo. La unua de Dario en la jaro 491 a.K. finiĝis kiam la militŝiparo detruiĝis ĉe la monto Athos, la dua per la batalo ĉe Maraton.
Dario fidis, ke la atenanoj estis nepreparitaj, kaj ne sendis grandan armeon. Kaj la greka Miltiado decidis batali ĉe Maraton por bari la vojon al Ateno. La batalo iĝis batalo inter pafarko kaj lanco. La persaj pafarkoj montriĝis netaŭgaj dum la vir-al-viro batalo. Kaj kiam la grekoj venkis, la novaĵon portis la kuranto Phidippedes al Ateno. Phidippedes unu kuriş tien reen al Sparto - kelktaga vojaĝo - por peti ties helpon, poste kunbatalis, kaj fine kuris al Ateno, kie li mortis pro la trostreĉiĝo, dum li elpremis la vortojn: Ĝoju, ni venkis.
La filo de Dario, Xerxo, komencis novan atakon - surmare kaj enlande. Tiam la plej fama batalo estis tiu ĉe la Termopyloj, kie la spartanoj batalis ĝis la lasta viro. Kaj la atenano Termistoklo atakis la persan militŝiparon en la malvasta markolo inter la insulo Salamis kaj la ĉeflando - kaj tiu markolo estis tro mallarĝa por la persaj ŝipoj.



Dekoracio de pordo en Persepolis montras la reĝon Dario dum interbatalo kun la Malbono (Ahriman).

La temo: Reĝo kiu batalas kun iu besto havas multajn pli fruajn ekzemplojn, speciale ĉe la asirianoj.



Malnovaj religiaĵoj el la Zoroastra religio: Altaro, vazo por fajro kiu reprezentis la ĉeestantan Dion, kaj transporteblan altaron.


Aleksandro.

Aleksandro la granda komencis sian konkeradon per venko super la grekoj Poste lia armeo venkis Darion en la batalo ĉe Issus en 333 a.K, poste li konkeris Egipton - kiu estis persa provinco, kaj iris en Azion krozante la riveron Tigris tuj apud la amasoj, kiuj kovris la iaman asirian ĉefurbon Ninivo. Li venkis la nombre pli grandan persan armeon, kaj post kelkaj tagoj loĝis en la vintra palaco de la persa reĝo en Babilono.
Dum la postaj kvin jaroj li trairis en grandaj ringoj tra la granda regno, ĝis li venis al la limoj de Hindujo, kie li cedis al la plendoj de la lacegaj trupoj. Li iris laŭ la rivero Indus, kaj velis sur la Hinda Oceano, kaj iris okcidenten laŭlonge ties bordoj, akompanata de militŝiparo, kiun li konstruis ĉe Indus. Sed la vojo kondukis tra vastaj dezertoj, kiuj kostis multajn vivojn inter la soifantaj kaj malbone nutritaj soldatoj, kaj pluraj el la trupoj restis en la regionoj kiujn ili trapasis. Tiel la greka kulturo ekkreskis, kaj ĝis hodiaŭ la legendoj pri Iskandar (Aleksandro) vivas en la regionoj de Samarkando ĝis Afganistano.

Post la morto de Aleksandro la imperio dividiĝis, kaj la generalo Seleukis Nekator prenis Iranon, Irakon kaj parton de la Malgranda Azio, kaj nomis sin Shahinshah, aŭ Reĝo de la reĝoj de Irano. Egipton prenis Ptolemo.
Sub la seleŭkidoj la grekaj lingvo kaj kulturo dominis, sed la aramea restis uzata inter la persoj.
Fine la seleŭkidoj perdis la kontrolon de Irano al la Partianoj, Skita tribo fama kiel arkpafantoj kaj ĉeval-viroj. En la jaroj ĉ 250 a.K. ili fondis imperion, kiu dum longa tempo estis rivalo al Romo.
Nur en 226 a.K. fondiĝis nova persa dinastio per reĝo Ardeshir, fondanto de la sasanidoj. Oni povas juĝi la eventojn per inskriboj sur moneroj. La silko-vojo al Ĉinujo malfermiĝis tra Turkestano, kaj ĉina silko aperis en Sirio kaj Egipto, dum teksaĵoj el Sirio trovis vojon al Mongolio. La ĉina vojaĝanto Ch´ang Chíen - sendito de la imperiestro por krei aliancon - eble enkondukis vinon al Cinujo tra Irano. Kaj ni ĉiuj konas frukton kiu venis de Cinujo al la okcidento tra Irano - kaj ankoraŭ portas la nomon "persiko".

La Sasanidoj.

Ardeshir, konkerinte Babilonon, prenis la titolon Shahinshah. Lia familio, oni asertis, devenis de la dinastio de Ciro, sed pro la helenisma periodo tio ŝajnas pli legendo ol vera historio.
Sed venis novaj herooj, kiaj Bahram, kiun mencias Omar Khayyam, sub lia kromnomo "Sovaĝa Azeno". Pli fama estas Chosroes, aŭ Anushirvan la Justa. Por atingi al la trono li devis batali kontraŭ herezoj kaj komplotoj de Mazdak. Poste li venkis en bataloj kun Romo, subiĝis la abisiniojn kaj kontraŭstaris atakojn de la Hunoj kaj Kazaroj.
Dum lia regno multaj libroj venis el Hindujo, tradukiĝis kaj poste famiĝis pere de la islama periodo. Car en 636 la araboj sub Sa'd ibn Abi Waqqas venkis, kaj enkondukis la novan religion.



Sigelo, kiu montras Darion dum li ĉasas leonojn. Supre la simbolo de Ahuramazdo.

# EL ITALUJO

El Italujo ni ricevis ĝojigajn leterojn. La unua raportas pri eventoj en junio, aŭgusto kaj septembro, dum la dua enhavis artikolon kaj bildojn kiuj esperebble iĝos ankaŭ presitaj.



Maldekstre: la remuloj forlasas la havenon: La granda aventuro komenciĝas.

En junio estis du renkontiĝoj kun la lernantoj de la media lernejo "Maria Mazza" en Verono, kun lumbildoj pri skoltisma vivo La profesoro Mariotto de la lernejo deziras interŝanĝon kun samnivelaj lernejoj.

En aŭgusto okazis la 7.a nacia marŝkonkuranco en Verono kun 1300 partoprnantoj. Estis donaciita Esperanta Pokalo.

En septembro kokazis la bicikla regiona konkurso kiun aranĝis "Pedale Scaliegro" en Verono kunlabore kun la esperantisto Vesentini. La partoprenantoj estis 14 - 16 jaraĝaj, kaj Esperantopokalon gajnis Fabrizi Mazzetto el Fossò, Venecio. - En septembro ankaŭ okazis la bicikla Rally de Garda Lago por skoltoj kunigite kun la 14.a internacia skolta pentra kaj fotografa premio en Arco, Trento. Je tiu okazo oni povis disvastigi la celojn de SEL inter la 500 skoltoj alvenintaj per propra biciklo el la tuta Italujo.


Kaj jen venos la rakonto pri ĉasado de la blanka baleno Moby Dick, kiel ĝin rakontas nia NR Franko Abriani:



La lerta ĵibistino bone lofas ankaŭ la grandvelon per skoto.



Tridek-kvar junaj geskoltoj el norda kaj centraparto de Italujo havas rendevuon ĉe la Adratika marbordo.
La gajaspekta urbo Rimini estas plena da antikvaĵoj. Jen ĉi tie Gajo Julio Cesaro diris la famajn vortojn: "Alea iakta est!", kio en Esperanto estas "La ludkubon mi ĵetis!", kiam li jus pasis la riveron Rubikone en la jaro 49 a.K.
Nuntempe okazas ĉi tie unu el la jaraj skoltaj kursoj por navigacio per velbarkoj kaj remboatoj. Ankaŭ la instruistoj estas skoltoj, kaj ni ĉi tie loĝos dum 8 tagoj.
La bansezono daŭras ĝis la fino de septembro, sed la granda popolamaso tute ne ĝenas, dum la geskoltoj klopodas membriĝi en kvar patroloj kun nomoj 'Ŝarkoj', 'Mevoj', 'Kormoranoj' kaj'delfenoj', ĉar ili devas disvolvi propran interesan programon da aktiveco.
Ĉiutage ĝena ellitiĝo je la horo 06.30; tuj poste gimnastiko laŭ Ruffier metodo; teoria leciono; unua veter-rimarkigo; praktika navigacio dum 3 horoj; nova teoria leciono; dua veter-rimarkigo; praktika navigacio dum 4 horoj; teknika ekzercado; tria veter-rimarkigo el nia Meteorologia stacio, kaj je la 23.oo enlitiĝo.
Kaj por manĝi? Ho jes, ni havas tempon ankaŭ por la nutraĵo, tre bone kuiritan per skoltaj kuiristoj laŭ skolta maniero, kaj kun fiŝ-special-aĵojn! Sed ni ne mem kaptis la fiŝon: Ni estus nortintaj pro malsato antaŭ ol kapti fiŝon.
La ŝiparo konsistas el kvar 'FJ', unu 'Laser', du 'Karavelle', unu jakto du remboatoj kaj unu motorboato.
Preskaŭ 'galeranoj', duoble sidantaj ĉe la remiloj, la geskoltoj, laŭvice po duontage remadas almenaŭ distancon de 3 kilometrojn.... Ĉiam sen vidi balenon. Tiukaze la distanco estus multe pli longa.



Supre: "Oni pretigas la kutrojn, kaj ....."
Maldekstre: Oni alkuras por akiri la plej bonan pozicion kaj la harpunisto ĵetas. Ĉu Moby Dik evitos trafon?

## NACIAJ REPREZENTANTOJ

Aŭstrio f-ino Eva-Marie Fraunhofer, Badenerstr 7, A-2512 Tribuswinkel/Baden pr. Vieno.
s-ro Franz Schwärzler, Rathausstrasse 2, A-6900 Bregenz.
Belgujo s-ro L.J.VanGulck, Lt.Lippenslaan 33 bus 10, B-2200 Borgerhout.
Poŝtk.to Belga Skolta Esp.Sekretario 000-0327460-85. Tlf 031-3688.08
Brazilio s-ro Adonis Marcelo Saliba Silva, caixa postal 192, 35180 Acesita Mg.

Britujo s-ro David H Withey, 21. Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3ye.
Danlando s-ro Bjarke Nielsen, Erdalsvej 30, DK-2600 Glostrup.
Finnlando s-ino Irja Klemola, Nunna, SF-20660 Littoinen.
Francujo s-ro Patrick Deveughele, 53 Av de Rigny, Appt 64, F-94360 Bry sur Marne.
Germanujo s-ro Georg D Winkler, Haroldstrasse 47, D-41 Duisburg 1.
Hispanujo s-ro S.Aragay Galbany, Bassegoda 40-3-1, Barcelona 14. Tel 333 80 81.
Irlando s-ro Frank Dobbs, 8 Ailesbury Grove, Dublin 4.
Italujo s-ro Fr. Abriani, Via Falconetto 24, I-37100 Verona. Tel 045-525173.
Japanujo s-ro Sinzo Sumiya, Daido Kagaku Sooti K.K.16, Suekirotyo Kitatu, Osaka.
Kanado s-ro John H.F. Hoyle, Box 421, Forest Ont.
Helpa NR: s-ro Paul Ronald, 45, 10th Ave., Roxboro, Queb.
Madagaskaro s-ro Roger Randrianekena, T.P. - Box Postale 14, Ambatondrazaka
Nederlando s-ro B.J. Wijmer, Vreebos 41, Zoetermeer/2280. Tel 079-215868. Poŝtkto. 3335470.
Norvegujo s-ro H.A.Rosbach, Bambleveien 2, 3700 Skien. Tel 035-21848. Poŝtkonto 8030413.
Novzelando s-ro D.B. Pease, Unit 1, 27 a Campbell Rd, Royal Oak, Auckland 6.
Peruo s-ino J. de Skotte, Melecon Paul Harris 335/200 Barranco-Lima 4.
Portugalujo: s-ino Maria Teresa Nuñes Constáncio, Rua Freixo Capitao 16-2° Dto,Agualva - Cacem.
Svedujo peranto: s-ro Ragnar Hjorth, Kronobergsgt 25, S-11233 Stockholm.
Svislando: S-ro Erik Otte, Ecole d'Humanité, CH-6082 Goldern (Hasliberg)
Usono: S-ro Robert W Rapp 2043 Brannon S W, Austell GA 30001. Tf 404-948-8535

Informoj pri membreco:
En landoj kun Nacia Sekcio: Informiĝu ĉe NR kaj pagu al li la kotizon.

Individuaj membroj (nur en landoj sen N.R.!): Kotizo inkl. abono:
Junuloj ĝis 18-jaraj: Ned. gld. 3.30 aŭ egalvaloro.
Pliaĝuloj: Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.
Subtenantoj: Minimume Ned. gld. 5.00 aŭ egalvaloro.

Prefere pagu la kotizon al la kasisto: David H. Withey, 21 Brookfield Ave, Waterloo, Liverpool L 22 3 ye.

Adresoj de la Centra Komitato: Vidu la duan paĝon.

Konstanta adreso de S.E.L.: Postbus 433, Zaandam, Nederlando.

**********

La Skolta Mondo estas la oficiala revuo de Skolta Esperanto Ligo, kaj aperas kvarfoje en la jaro. Kontribuaĵoj estu sendataj al la redaktoro, Bambleveien 2, N 3700 Skien, plej malfrue ĝis la 10.a de februaro, majo, aŭgusto aŭ novembro.

Ekspedanto de la gazeto estas la kasisto. Informu al la Nacia Reprezentanto je malĝusta adreso, nericevo k.s. Se NR ne estas en via lando, informu al la ekspedanto.




Maldekstre: Je la lasta tago la skoltmaristinoj salutas la senliman, amikan maron.

Cu baleno? Ho je, la Blanka Baleno! Tial la estro 'Aĥab' ekkrias ordonojn laŭte dekstre kaj male, la boatestro sibligas la vipon, la plej lerta harpunisto personigas 'Kuikueg' kaj ĵetas sian gafon.....
Preskaŭ ĉiam Moby Dik imune fuĝas for de la batalo, sed iafoje ĝi estas trafita kaj subakvigita! En tiu okazo oni devas ŝanĝi..... la "balenon", kaj tiamaniere la ĉaso povas daŭri por du ŝipanaroj, kiuj konkursas.

Vespere la venkistoj tostas per abunda ruĝa vinbera suko.

***************

Cu vi konas la ludon de Moby Dik? Gi disvolviĝas inter du aŭ pliaj remboatoj - la ĉasistoj. La 'baleno' estas anstataŭata per unu "fjasko" - vitra botelo pajle kovrita, en Italujo uzata por vino. Alia pli rapida velbarko (jakto aŭ kutro) trenas la "balenon", kaj la ĉasistoj devas trafi ĝin. Venkas kiu sukcesas!

Franko Abriani.

LA SKOLTA MONDO REDAKCIO: Bambleveien 2
N 3700 Skien

NE ISSN 0037 6558

BKA UNIWERSYTECKA